

Kluba Bulteno

Organo de Klubo Esperantista en Oslo

N-ro 2 2009

Vendredon la 17an de aprilo

57a jaro

Kalendaro

(Ni komencas je la 19a horo. Kie? / Hvor? – vd. p. 4 / se s. 4)

Lundon la 20an de aprilo (semajno / uke 17) – *mandag*

La Nobel-pacpremio – ĉu la komitato fidelas al la testamento de Nobel? Douglas Draper prezentos la kritikon.

Nobel-fredsprisen - Er komiteen trofast mot Nobels testamente? Douglas Draper legger fram kritikken.

LUNdon la 4an de majo (semajno / uke 19) – *mandag*

Kjell Peder Hoff raportos pri la 25a PSI – Printempa Renkontiĝo Internacia ”por la tuta familio” (kaj unuopuloj) – en Germanio. + EKSTERORDINARA ĜENERALA KUNVENO, ► p. 3.

Kjell Peder Hoff beretter fra det 25. familiearrangementet – ”for hele familien” (og andre) i Tyskland.

+ **EKSTRAORDINÆR GENERALFORSAMLING, se s. 3.**

Lundon la 18an de majo (semajno / uke 21) – *mandag*

Douglas Draper klarigos la principojn de stenografio, kaj kiel ĉiu povas ekuzi ĝin parte kaj laŭgrade.

Douglas Draper forklarer prinsippene stenografi bygges på, og hvordan enhver kan ta det i bruk delvis / gradvis.

Lundon la 25an de majo (semajno / uke 22) – *mandag* **kromkunveno ekstramøte**

Kiel fartas la sveda E-movado? Douglas Draper ĵus revenis de la landa kongreso de Sveda E-Federacio.

Hvordan går det med E-bevegelsen i Sverige? Douglas Draper har ferske inntrykk fra det svenske landsmøtet.

LUNdon la 1an de junio (semajno / uke 23) – *mandag*

La pentekosta lundo. Neformala kunveno. Prepare al la landa kongreso.

Annen pinsedag. Uformelt møte. Vi forbereder landsmøtet.

Lundon la 15an de junio (semajno / uke 25) – *mandag*

Tuj post la landa kongreso. Ni resumos la rezultojn kaj diskutos la vojon antaŭen por NEL.

Like etter landsmøtet. Vi summerer opp resultatene og diskuterer veien framover for NEL.

OKAZIS

Lundon la 5an kaj (ripete) lundon la 19an de januaro

Sojle de la Zamenhof-jubilea jaro ni demandis al ni, kiel verki ekz-e gazetan kronikon pri Zamenhof – kiel prezenti lin al modernaj legantoj? Legante tekstojn de Zamenhof mem ni vidis kiel li kreis la lingvon impone facile lerneblan kaj kiom grava por li estis la ”interna ideo” de Esperanto. Sed ”la afero Esperanta estas nur parto de ĉi tiu ideo”, li skribis – la ideo de hilelismo / homaranismo, la komuna religia kerno kiu iam reunuigu la homaron. Tiun projekton glutis la unua mondmilito, dum kiu ankaŭ mortis Zamenhof. Sed hodiaŭ (*Heroldo* 16/2008, p.4) lanĉiĝas planoj por repreni tiun fadenon.

Lundon la 2an de februaro

Snorre Benum, jam vizitinte kiel pensiulo esperantistojn sur ĉiuj kontinentoj krom Afriko, serĉis per la adreslisto *Pasporta Servo* gastigantojn en tiu lasta mondparto. Li trovis tie vilaĝestron Mramba Simba, kiu anstataŭ la kutimaj informoj pri maksimuma daŭro de restado k.s. proponas al gastoj ke ili instru Esperanto al la lokanoj! Do Snorre iris al Tanzanio kaj gvidis kurson por gejunuloj dum du monatoj. Mankis lernolibroj, sed li elturniĝis uzante la instru-bildojn de Stano Marĉek (aŭtoro de la nova *Esperanto per rekta metodo*). Inter aliaj lokaj evolu-projektoj – kiujn subtenas Snorre kaj liaj gefratoj – estas konstruo de mezlernejo. Por ĝi oni jam havas permeson de la aŭtoritatoj pri Esperanto kiel deviga fako!

(Vd eo.wikipedia.org/wiki/Mramba_Simba_Nyamkinda kaj www.kono.be/mazingira/eo.html)

Lundon la 16an de februaro

La temo estis la financa krizo, sed unue ni kolektis la Esperantajn terminojn de tiu kampo, esplorante precipe per PIV kaj la sveda-Esperanto vortaro – kaj nia kluba akademiano. Ni trovis ke *avkastning* povas esti aĝio, ke por *krakk* pli bona ol la vortara ”kraŝo” estas ”kolapso” kaj ke por la jam ŝajne internacia *hedge fund* apenaŭ aktualas alia radiko ol *heĝo*. Tion farinte, ni konsideris la efikojn de la krizo sur la ekonomio de la norvega E-movado. La malaltiĝo de la interezo (*rentefoten*) subfosos la Legacon Uhlen sed estos favora por tiuj membroj kiuj havas monŝuldon. Aliflanke se iuj senlaboriĝos, ili eble devos redukti siajn asociajn kotizojn.

Fine ni legis la rekomendojn de Bjarte Kaldhol investi en akcifonduso ĉi-jare, dum la kurzoj estas malaltegaj, ĉar certe ili kresk(eg?)os dum la venontaj 2-3 jaroj. Sed regas dubo en la estraro, ĉu ni rajtas riski perdon pro tamena plufalo.

Lundon la 16an de marto

Asbjørn atentigis ke ni perdadas membrojn, ofte pro naturaj kaŭzoj. Sed eblas iom redukti tiun perdon se la membroj evitos nutri sin per kancerigaj manĝaĵoj. Li koncize prezentis rezultojn de lastatempaj esploroj pri substancoj kiuj certgrade protektas kontraŭ kancero (laŭstatistike). Fine li surtabligis bongustan supon el i.a. tomatoj, ajlo kaj bazilio, kiuj ĉiuj havas protektan efikon kontraŭ prostata kancero (ĉeestis, kiel kutime, nur viroj). Sed problemon prezentis la terminoj: por la koncernaj substancoj li devis mem adapti plurajn ne-PIVajn vortojn. Ni instigis lin serĉi fakulojn en eksterlando por provi evoluigi tiuteman terminaron.

DD

Ĉu iu bezonas praktikan helpon?

Er det noen som trenger praktisk hjelp?

Du polaj junulinoj (17-jaraj) – unu el ili estas denaska Esperantisto – venos al Lillestrøm / Oslo somere, esperante trovi laboron – ekz-e farbadon, ordigadon aŭ ion en ĝardeno. Ili ankaŭ bezonas loĝejon ne tro longe for de la laborejo. Ĉu vi havas ion por oferti?

To polske jenter (17 år) – den ene snakker godt esperanto – kommer til Lillestrøm / Oslo til sommeren, og håper å finne arbeid, f.eks. oppussing eller hagearbeid. De trenger også et sted å bo, ikke for langt fra arbeidsstedet. Har du noe å tilby?

Kontaktulo: Kjell Peder Hoff, <kkkjell@online.no> 63 83 33 19 (sed li forestas ĝis dimanĉo / er bortreist til sĉndag 19.4 kaj denove / og igjen 21-23.4).

EKSTERORDINARA ĜENERALA KUNVENO

EKSTRAORDINÆR GENERALFORSAMLING

Ni bezonas mallongan formalan kunvenon lundon 4. majo por trakti du aferetojn: 1. aprobi ĝustigon de la jarkalkulo 2008: Elspezo de 2924 kr estas misregistrita en subkonto pri presado, dum ĝi fakte estis asigno el la fondaĵo Gustavsen. 2. Eblas plenigi la estraron, ĉar Heming W. Thorbjørnsen pretas iĝi estrarano. (Sed pro tio vakiĝos posteno de anstataŭanto – ĉu iu havas (sin)proponon?)

Vi trenger et kort formelt møte mandag 4. mai for å behandle to små ting:

1. godkjenne en rettelse til regnskapet for 2008: En utgift på 2924 kr ble feilregistrert i posten for trykking, mens den faktisk var en bevilgning fra Gustavsen-fondet. 2. Vi kan nå komplettere styret, da Heming W. Thorbjørnsen er villig til å gå inn der. (Men derved blir en varaplass ledig – har noen et forslag, ev. på seg selv?)

Ĉu vi havas spacon hejme

por stoki (forpakitajn) librojn? Ni bezonas liberigi spacon en la kelo de Esperantonia. Bv. turni vin al nia oficejo se vi eble povos helpi.

Er det noen som har plass

hjemme hvor vi kunne få lagret noen esker med bøker? Vi trenger å frigjøre plass i kjelleren i Esperantonia. Henv. kontoret hvis du kan hjelpe.

Ĉu iu volas lui kunvenĉambron? Vil noen leie møterom?

POR KOVRI la plialtiĝintan domluon ni volas **luigi nian kunvenĉambron** al eksteruloj. Ĉu vi scias pri organizo aŭ grupo kiu volus lui por vesperoj aŭ semajnfino? Broŝuro kun detalaj informoj kaj bildoj haveblas.

FOR Å DEKKE den økte husleien prøver vi å få leid ut møterommet vårt til andre organisasjoner. Kjenner du noen som kunne være interessert i å leie for en kveld eller en helg? Brosjyrer med nærmere opplysninger og bilder kan du få fra kontoret.

Ĉu vi volas aĉeti librojn aŭ insignojn? / – kjøpe bøker .. ?

Ekz-e *Pasporta Servo** – aŭ la novan lernolibron de Stano Marĉek *Esperanto – direkte metode* (danan) aŭ *Bildvortaron* aŭ insignojn? La klubo (kiu en novembro transprenis la librovendadon de NEL (kiu mem transprenis de la Eldonejo en 2007)) ĝenerale ne importas stoketojn, sed povas havigi 3 ekz el eksterlando se pluraj membroj mendas.

*La 2009-eldono aperos en majo.

Norvega Esperantisto 3:

nova limdato! sabato la 25a de aprilo

Kunvenejo ("Esperantonia") Olaf Schous vei 18 (enirejo en Schouterrassen) en Sinsen. Buso 31 aŭ tramo 17 al Rosenhoff kaj de tie iru supren laŭ Båhusveien – aŭ malsupren de Sinsen T (buso, metroo) / Sinsenterrassen (tramo).

Klubo Esperantista en Oslo, Olaf Schous vei 18, 0572 Oslo.Tlf. 22 35 08 94
www.esperanto.no/oslo Retpoŝto: oficejo[a]esperanto.no ([a] = @)
Poŝtĝiro 0532 36 19699 (sed kotizon pagu al NEL 0533 05 22870).